# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:30; augusto 5.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: sen. Sume 300 KB


## Ekis la UK en Aruŝa

Jen saluto de la urbestro de Aruŝa, Maximilian Iranghe, el la unua numero de la Kongresa Kuriero.



Aruŝo sabaton, la 3-an de aŭgusto 2024 numero 1

**La Voĉo de Kilimanĝaro**

Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto

**Urbestra salutparolo**

Estimataj gekongresanoj, karaj esperantistoj!

*Karibu Arusha*, bonvenon al Aruŝo.
Por la urbestro de Aruŝo kaj por nia urbo estas honoro akcepti unuafoje en Afriko kaj en Tanzanio la Universalan Kongreson de Esperanto – rimarkindan renkontiĝon, kiu ne nur kunigas personojn de diversaj horizontoj, sed ankaŭ festas la idealojn de paco, amikeco kaj reciproka interkompreniĝo.
La emo de la Esperanto-movado kontribui al mondo pli sana, pli varia estas subtenenda. Tanzanio estas grundo kie ĝermas ĉiuj bonaj semoj. Nia lando estas ideala loko por diskuti la temon "Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo" kaj esplori la profundajn ligojn inter nia interagado kun nia natura medio kaj nia kapablo komuniki kaj kunlabori kiel homoj.
Profitu ĉi tiujn tagojn de interŝanĝoj, debatoj kaj renkontiĝoj por plifortigi la ligojn, kiuj kunigas nin preter vortoj. Kune, ni povas konstrui estontecon kie ĉiu voĉo estos aŭdata, kie ĉiu kulturo estos respektata kaj kie ĉiu individuo povos esprimi sin libere, en la lingvo de sia elekto.
Por ni gravas akcepti tiun ĉi kongreson por ankaŭ doni al vi la ŝancon sperti niajn urbon kaj landon kun ĝiaj naturaj parkoj, plaĝoj, faŭno kaj flaŭro kiel nepre vizitindajn kaj ŝirmejojn por ĉiuj.
Refoje la urbo Aruŝo bonvenigas vin al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto kaj deziras fruktodonan kaj riĉigan restadon al ĉiuj partoprenantoj!

## Rezulto el la Kongreso de ILEI en Brazilo

Legu la rezolucion de la 57-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, okazinta ekde la 20-a de julio 2024 en Maceió (Brazilo) https://sezonoj.ru/2024/07/ilei-33/

"Pro prelego en la Kongreso de ILEI, mi estas interesiĝanta pri multkultura edukado aŭ instruado. mi trovas multon pri tiu koncepton, pri la debatoj kaj pri la realigo en Eŭropo kaj Usono. sed nun mi demandas min kaj vin: ĉu simila koncepto estas

debatata kaj realigata ekster Eŭropo. ekzemple en la multkultura **B**arato aŭ en la multetna Togolando?"

Renato Corsetti

## Rezultoj el la Esperanto-Tago

La 26-an de julio, en la Tago de Esperanto, la jekaterinburga esperantisto Viktoro Kulakov estis intervjuita en realtempa elsendo *Utrennij ekspress* de televidaj ĵurnalistoj de la loka jekaterinburga 4-a televidkanalo. Bonvolu vidi la registraĵon de la video ĉe: https://vk.com/ekaterinburgo aŭ transirinte rekte per la ligilo

https://vk.com/video-19185844_456246719

Raja Kudrjavceva

## La aŭgusta Ondo

Antaŭ 55 jaroj, la 1-an de aŭgusto 1969 forpasis Hugo Steiner, elstara aŭstra esperantisto, iniciatinto kaj la unua direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo ekde ties fondo en 1929. En la listo de Esperantaj jubileoj kaj memordatoj por aŭgusto 2024, kompilita de Aleksander Korĵenkov, estas ankaŭ Hideo Yagi, Edmond Privat, István Szerdahelyi kaj aliaj eminentaj samideanoj. Legu la liston en *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/08/augusto-3/

## Rusa literaturo tradukita kaj sekurigita

Verkoj de Ivan Bunin, Aleksandr Kuprin, Maksim Gorkij, Fjodor Sologub, Leonid Andrejev, Ivan Ŝmeljov, Aleksej N. Tolstoj, Vladimir Nabokov kaj Aleksandr Grin jam aperis kadre de la traduka projekto *Rusa novelaro 2* en la ĉiusezona bitgazeto *La Ondo de Esperanto*. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2024/06/runo-2/

## Brazila muziko refoje

*Eks-sekreta* video de la kanto *Johano kaj Maria* (originale *João e Maria*), kune verkita kun **Sivuca**, tradukita de **Vitor Mendes** kaj kantita de **Eida Lima**:

**https://youtu.be/0iD2cUweHTQ**

## Lokaj grupoj – registro starigita

UEA (pli precize Renato Corsetti) starigis liston de lokaj grupoj, kiu meritas grandegan alfluon de pliaj grupoj. **Provu trovi** ĝin ĉe: <uea.org/Lokaj-esperanto-grupoj>.

Jan la stato de la listigo en la 4-de junio.

**Britio:** Londono
**Ĉeĥio:** Prago
**Germanio:** Herzberg-am-Harz
**Hispanio:** Santander, Kalabrio, Madrido
**Hungario:** Budapeŝto, Nyiregyháza (**SMG:** ege mankohava listigo!)
**Italio:** Romo
**Rusio:** Moskvo, Tomsko.
**Svislando:** Bazelo, Ĝenevo, Laŭzano, Zuriko, Berno kaj Wil

Do, sume dek en ok landoj. Ekestu kvindek! Anoncu vin ĉe Renato Corsetti kaj SMG

En Hungario jen la vera listo: Nyireghyhaza, Budapeŝto (la plej aktivaj), Debrecen, Dombovar, Vac, Tata, Eger, Papa (apud), Hodmezovasarhely.

# Lokaj grupoj: dezirindaj informoj

Plena nomo de la grupo:
Retadreso:
Ofteco de renkontiĝoj:
Deziro ĝemeliĝi kun alilandaj lokaj grupoj:
Preferindaj regionoj por tiu ĝemeliĝo

## Facile pri Afriko

https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/afrihili-afrika-esperanto-r437/

## Virinoj kunvenas okaze de afrika UK

La Esperantista Virina Asocio en Afriko (EVAA) organizis la duan Afrikan Kongreson de Virinoj (AKVo), kiu okazis de la 30-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2024 en Aruŝo, Tanzanio, tuj antaŭ la 109-a Universala Kongreso de Esperanto (UK). La 2-a AKVo okazis danke al subteno de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj *Esperantic Studies Foundation* (ESF).

La kongresa temo estas *Virinoj: leviloj de daŭrigebla disvolviĝado.* Tiu ĉi temo fokusiĝos al la potencigo de virinoj. Ĝi emfazas la fakton, ke investado en la subteno kaj trejnado de virinoj estas disvolviĝa levilo por landoj kaj kontinentoj. Estas planataj multaj aktivaĵoj, inter ili prelegoj, kundivido de spertoj, artaj atelieroj, instruado de Esperanto kaj komunaj vizitoj.

La dua AKVo okazis en la katolika loĝejo *Catholic Archidiocese of Arusha Center House*, La kongresejo havas belan ĝardenon, programsalonon, kuirejon kaj komfortajn dormoĉambrojn. La kongresejo estos poste uzata de la Internacia Infan-Adolesktanta Kongreseto (IIK). EVAA kaj UEA invitas vin partopreni. Jam 50 esperantistinoj de diversaj aĝogrupoj aliĝis el pluraj landoj. La organizantoj nun aparte bonvenigas virinojn ekster Afriko. Mirejo Grosjean sendis al ni la rezolucion de tiu kunsido, kiun ni aperigos en la sekva EKO-komuniko. Pli da informoj pri la kunveno ĉe Eventa Servo: https://eventaservo.org/e/VirinaKongreso.

## Memore pri Montevideo

Julie pasis 70 jaroj depost la memorinda kongreso de Unesko en Urugvajo, kie tiu organo akceptis la unuan rezolucion favore al Esperanto.

## La Kongresa Libro de Aruŝa ĉe UEA aŭ la renoma Ondo

La bita versio (pdf) de la Kongresa Libro de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu nun okazas en Aruŝo (Tanzanio) estas libere elŝutebla en la retejo de UEA; legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2024/08/afriko-39/

La 3-an de aŭgusto 2024 en Aruŝo komenciĝis la 109-a Universala Kongreso de Esperanto. Dum la unua kongresa tago en la interna korto de la kongresejo estis organizita la tradicia Movada Foiro. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* https://sezonoj.ru/2024/08/afriko-38/

## La Kongresa Universitato en Aruŝa

En la UK en Tanzanio okazis kiel kutime la Internacia Kongresa Universitato (IKU), ĉi-foje kun 14 prelegoj. Ĝi ne nur okazos ***en*** Afriko, sed grandparte ***per*** afrikanoj kaj ***pri*** temoj rilataj al Afriko.

Estos tri kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (**AIS**), Kvar-lingvaj r**esumoj** (inkluzive la svahilan) troviĝas en la IKU-paĝo https://uea.org/teko/IKU.La prelegoj estos eble spekteblaj defore (depende de la loka retkonekto), ĉe https://huji.zoom.us/j/7508982919 .

Cetere atendos vin la **IKU-libro** (aldone la kovrilo) kun ĉ. 200 paĝoj kaj 16 tekstoj (inkluzive 7 de SUS en Strasburfgo) por speciala kongresa prezo de 15 eŭroj.

Jam 30 jarojn okazas la kumunaj IKU-AIS sesioj. Tiu ĉi jubileo estas okazo konatiĝi kun la lastatempa **aktiveco de AIS**, per la ĵus publikigita intervjuo en Libera Folio https://www.liberafolio.org/2024/07/23/ais-vivas-plu-ec-sen-san-marino/.

========= vortoj: 900 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj dudek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.